

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2018:2

Skandinava Kongreso


Inter la 10-a kaj 13-a de majo okazis la 2-a Skandinava Kongreso sur la pramo inter Kopenhago kaj Oslo, por rememori la 1-an Skandinavon kongreson kiu okazis en Gotenburgo en 1818. Dum la ŝipado okazis la jarkunvenoj de Dana Esperanto-Asocio kaj de la Sveda Esperanto-Federacio. La prezidantoj de la 3 landoj deklaris sia intencon plifortigi la kunlaboron inter si per: regulaj skajpkunvenoj inter la gvidantoj de la tri asocioj, instigi la kunlaboron inter siaj junularaj organizoj, esplori la eblecojn aranĝi komunajn jarkunvenojn ĉiu tria jaro, interŝanĝo de informoj kaj funkciado de komuna retejo. Dumtage estis ekskursoj en Oslo kie oni vizitis la fortikaĵon Akershus kaj la urbodomon, kie ni estis akceptitaj de la vicurbestrino. En Kopenhago estis du ekskursoj, unu kun promeno "En la piedspuro de Zamenhof", t.e. la lokojn kiujn Zamenhof vizitis dum sia restado en 1908. La dua ekskurso esti pere de havena boat-rondiro ku. Entute tre sukcesa kongreso kun ĉeesto de 45 samideanoj. Ni esploros ĉu la aliaj nordiaj organizoj volus aliĝi al nia iniciato.

Raportas *Ileana Schroder*

Jubileumsprogrammet ombord på DFDS Pearl Seaways bjöd bl a på, förutom gemensamt framförande av esperantohymnen och tal av de tre ländernas ordföranden, en sketch framförd av Jens S. Larsen och Finn Österbaek.

De deltagande ungdomarna från Danmark och Sverige ordnade under resan även egna programpunkter.

Ann-Louise Åkerlund



Deklaro

Okaze de la Jubilea Skandinava Kongreso, festante la 100-jaran datrevenon de la unua Skandinava Kongreso, Dana Esperanto-Asocio, Norvega Esperantista Ligo kaj Sveda Esperanto-Federacio deklaras sian intencon plifortigi la kunlaboron inter si per:

- regulaj skajpkunvenoj inter la gvidantoj aŭ reprezentantoj de la tri asocioj
- instigo de kunlaboro inter siaj junularaj organizoj
- esploro de eblecoj aranĝi komunajn jarkunvenojn, kursojn, ekzamenojn aŭ aliajn fakajn aŭ kulturajn eventojn
- interŝanĝo de informoj pri novaĵoj, reklam-materialoj, lerniloj, stud-metodoj, eldonaĵoj, movadaj, kulturaj aŭ fakaj aranĝoj
- funkciado de komuna retejo esperantonordio.org

Ni esploru, ĉu aliaj nordiaj organizoj, ekzemple el Finnlando kaj Islando, volus aliĝi al nia iniciato.

Oslo, la 11-an de majo

[Signature]
Dana Esperanto-Asocio

[Signature]
Norvega Esperantista Ligo

[Signature]
Sveda Esperanto-Federacio

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2018 • 106-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen: laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto-gbg.org/eldona/

E-post: eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperantoforbundet.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Under SEF:s årsmöte den 11 maj 2018 på båten mellan Oslo och Köpenhamn valdes Puff Östling, som varit styrelsemedlem sedan 2013, till ordförande efter Olof Pettersson, som återgick till posten som vice ordförande. Kvar i styrelsen finns Ann-Louise Åkerlund som sekreterare, Arnulf Naif som ledamot och Jin Guo som ersättare. Ny ledamot blev Tatu Lehtilä från Stockholm och ersättare Lotta Lauritz från Ersnäs utanför Luleå. Tatu har under flera år varit ordförande i Stockholmsklubben och Lotta är aktiv i nätverket Norrbottens Esperantosällskap.

Anita Dagmarsdotter utsågs till att ingå i valberedningen tillsammans med Siv Burell från Göteborg, med Soile Lingman från Stockholm som ersättare. Ulrika Hoppe nyvaldes till revisors-suppleant medan Per-Olov Johansson från Malmö och Jill Hillford från Helsingborg omvaldes till revisorer.

Vi riktar ett tack till den gamla styrelsen och övriga funktionärer, särskilt till Anita och Ulrika som lämnar styrelsen. Anita aviserade redan när hon blev kassör för två år sedan, att den perioden skulle bli hennes sista som styrelsemedlem. Hon blev esperantist som 17-åring och fyller i år 80 år. Under årens lopp har hon ofta haft ansvarsfulla styrelse- och funktionärsposter, de senaste två åren som kassör i SEF och dessförinnan skötte hon under 10 år förbundets bokföring.

Årsmötet hölls på svenska enligt önskemål från deltagare i förra årets möte. Stadgeändringen om 12-månadersmedlemskap röstades igenom för andra gången och blir därför gällande för alla nya medlemmar. De klubbar som inte accepterar denna nyordning får själva ta hand om de medlemmar som tillkommer under året och rapportera in dem vid årsskiftet.

Styrelsen kommer fortsättningsvis bara att arrangera årsmöten och inte att ansvara för att anordna någon kongress. Nästa år kommer årsmötet att hållas i Stockholm och eventuella kringaktiviteter står Stockholms- och Uppsalaklubbarna för.

Den nya styrelsen har haft sitt första möte via Skype. Vi har gjort upp en mötesplan med ett Skype-möte en gång i månaden utom i juli och planerar att träffas under ett veckoslut i september, antingen i Uppsala eller i Stockholm.

Vi avser att anordna en ny Funktionärsträff i Herrljunga, preliminärt den 6-7 oktober. Dessutom planerar vi att som vanligt delta i Europeiska Språkdagen, att i samarbete med Göteborgsklubben och Förlaget återuppta vårt deltagande i Bokmässan och att med hjälp av Stockholmsklubben vara representerade vid Mänskliga Rättighetsdagarna i Stockholm i november.

Klubbar, grupper eller enskilda medlemmar som har planer eller idéer för verksamhet som gagnar spridandet och användandet av esperanto kan ansöka om medel ur någon av våra fonder. Läs mer på vår hemsida:

<http://esperantoforbundet.se/index.php/verksamheten/stodja-medlemmar> eller kontakta oss i styrelsen via svenska@esperantoforbundet.se.

Sukcesa kongreso – kelkaj voĉoj

La 1-a Skandinava Esperanto-Kongreso (SEK) okazis en Gotenburgo en 1918, sed montriĝis tre malfacile celebri la centjariĝon de tiu evento en la sama urbo. Tial oni decidis aranĝi la 2-an SEK sur la pramo inter Kopenhago kaj Oslo inter la 10-a kaj 13-a de majo, kaj tio montriĝis esti tre bona ideo. Oni esperas ripeti tian plurlandan kongreson ĉiun trian jaron.

La pramo enhavas kelkajn tre taŭgajn, diversgrandajn konferencajn ĉambrojn. En unu el ili okazis la ĝeneral-kunvenoj de Dana Esperanto-Asocio kaj poste Sveda Esperanto-Federacio, en alia pli granda ĉambro intertempe okazis komuna jubilea aranĝo. Tiu konsistis el prezentado de la landaj Esperanto-historioj de Danio, Norvegio kaj Svedio, sekvata de skeĉo.

La skeĉo ne estis tre profesie aktorita, sed la aktorantoj Jens S. Larsen kaj Finn Østerbæk (vidu bildon) parolis sufiĉe laŭte kaj malrapide tiel ke la spektantoj povis aprezi la ideon. La skeĉo estas bazita sur la tre fama en Danio “Samlernejanoj”, en kiu du viroj erare kredas koni sin el la bazlernejaj jaroj. En nia skeĉo temis pri “Kongresaj konatoj”, kiuj erare kredis rekoni unu la alian el la sama kopenhaga Universala Kongreso de Esperanto; sed UK okazis kvarfoje en Kopenhago!

La pramo veturis dumnokte, kaj dumtage estis ekskursoj en Oslo kaj Kopenhago. En Oslo la kongresanoj vizitis fortikaĵon Akershus kaj la urbodomon, kie akceptis ilin la vicurbestrino Khamshajiny Gunaratnam. En Kopenhago estis du ekskursoj, unu kun promeno

“hof” sekvata de havena boat-rondiro, alia pli longa promeno “Esperanto en la publika spaco de Kopenhago”. Ni ne kutimas fanfaroni pri tio, tamen Kopenhago efektive ludas tre gravan rolon en la historio de la Internacia Lingvo (ne nur ĉar Zamenhof vizitis la urbon en 1908).

Eble la glata organizo de la kongreso influis ke la suma nombro de partoprenantoj estis ne pli ol 45. Tamen ĝi meritis esti almenaŭ la duoblo de tio.



Jens S. Larsen

Nia Jubilea Skandinava Kongreso, aŭ Tri-landa Kongreso kiel kelkaj preferas nomi ĝin, fariĝis sukcesa. Ni babilis, diskutis, ridis, kantis, amuziĝis, interkonatiĝis. 31 partoprenantoj el Danio, Svedio kaj Italio surŝipiĝis en Kopenhago kaj 15 el Norvegio kaj Svedio en Oslo.

DEA havis sian jarkunvenon en la konferenceto de la ŝipo survoje de Kopenhago al Oslo. Verŝajne ĝi iris glate, ĉar laŭ la tagordo ĉiuj estraranoj akceptis fariĝi reelektitaj. En Oslo ni kune kun la novalvenintaj partoprenantoj faris ekskurson tra la fortikaĵo de Aker kaj vizitis la belan urbodomon.

Reveninte en la ŝipon ni kolektiĝis en granda salono en la konferenceto por la jubilea programo. Ni kantis la himnon, la tri prezidantoj faris mallongajn paroladojn, la norvega prezidanto Mario Machlik montris kelkajn bildojn kaj rakontis pri komuna vojaĝo al Tromsø post la UK en Stokholmo 1934, Jens S. Larsen kaj Finn Østerbæk prezentis amuzan skeĉon, Jens kaj Ana Røssum informis pri la ekskursoj en Kopenhago kaj Ana gvidis kant-atelieron. Krome Mario prezentis sian ideon pri Deklaro pri kunlaboro, kiun ni ĝoje

akceptis. La dokumenton post la sveda jarkunveno subskribis la prezidantojn de la tri landaj organizoj.

La svedoj transiris al alia ĉambro por havi sian jarkunvenon. Ankaŭ ĝi iris sufiĉe glate, kvankam la elektoprepara komisiono ne sukcesis trovi kandidatojn por ĉiuj postenoj en la estraro. Puff tamen akceptis fariĝi prezidanto dum Olof retiriĝis al la posteno kiel vicprezidanto. Anita forlasis la estraron, kiel ŝi jam, dum kelkaj jaroj fakte, anoncis. Anstataŭ Tatu Lehtilä elektigis estrarano. Restas nun solvi la problemojn pri la kasistaj taskoj.

La postan tagon, ree en Kopenhago, kelkaj iris aŭ vojaĝis hejmen dum ni aliaj ekskursis en du grupoj. Estis belega vetero kaj ni dum la promenoj lernis multon pri la vizito de Zamenhof en 1908 kaj pri aliaj famaj esperantistoj kaj/aŭ lingvistoj kaj iliaj signifoj por la esperantista movado en Danio.

Dum la reveno al Oslo NEL gvidis programon en la konferenceto de la ŝipo. Pri ĝi mi ne povas raporto ĉar mi forlasis la ŝipon en Kopenhago. Espereble iu alia sendos raporton.

Ann-Louise



Olof Petterson, SEF
(Sveda Esperantofederacio) / ALA



Peter Wraae, DEA
(Dana Esperanto-Asocio) / ALA



Mario Machlik, NEL
(Norvega Esperantista Ligo) / ALA

Pri la unua skandinava kongreso kaj aliaj kunaj aranĝoj

Dum la jarkunsido de SEF en 1916 estis proponite ke SEF kune kun la organizaĵoj de la norvegaj kaj danaj esperantistoj aranĝu tutskandinavan kongreson.

La laboron pri la kongreso, kiu okazis en Gotenburgo 6 – 10 aŭgusto 1918, gvidis Gustav Henrik Backman el Helsingborg. Li transloĝiĝis al Gotenburgo jam monaton antaŭ la kongreso por labori.

La Kongresa Gazeto aperis en 3 numeroj kaj la abonprezo estis SEK 1.

La kongresa kotizo estis SEK 5 kaj oni ricevis LE (La Esperon) senpage. Tri diversaj glumarkoj kaj kongresaj poŝtkartoj estis haveblaj.

Aliĝis 205 personoj el almenaŭ 7 landoj, 125 partoprenis.

Oni multe skribis pri la kongresplanoj en la gazetoj Esperanto Raporto de Centra Dana Esperantista Ligo kaj La Espero, kiu tiam estis komuna organo por SEF kaj NEL. En Esperanto Raporto por junio 1918 mi trovis interesan alineon, skribita de la signaturo C.H:

”Ni scias ke multaj danoj prokrastas sian aliĝon al la kongreso pro timo ke ili ne ricevos sufiĉe de manĝaĵo en Svedujo. Vere estas, ke oni havas malfacilaĵojn pri tiu en nia najbarlando, sed tamen laŭdire la kondiĉoj estas multe pli bonaj en Gotenburgo ol en Stokholmo. Kaj cetere oni ja ne vojaĝas al idealaj kongresoj por ĝui la ĝojon de l’ tablo.”

Post la kongreso aperis detala raporto pri ĝi en La Espero. Okazis diservo, pluraj prelegoj kaj paroladoj, kaj laborkunsidoj. Oni interalie decidis pri “starigo de skandinava konsilantaro de la tri landaj ligoj por komune decidi” kaj “rekomendi duan skandinavan kongreson en Kristiania 1920, tamen kun rajto de la tri ligprezidantoj interkonsente decidi” (citaĵoj el Jubilea Matrikulo de SEF 1931).

- En 1938 estis aranĝita la unua *Dan-Sveda Esperanto-tago* en Lund kun 400 partoprenantoj. Post la milito tiaj dan-svedaj tagoj okazis ĉiun duan jaron alterne en Skanio kaj Selando.

Internorda esperanto-kongreso en Oslo 1965

Nordlanda Esperantokongreso en Oslo 1965 (Tempo laŭ la provizora programo 19 – 22/6)

”La Nordlandaj Esperanto-Asocioj estas korespondintaj dum la printempo 1964 pri eventuala aranĝo de kongreso por siaj membroj. Fine ili interkonsentis: Oni elektis la norvegan ĉefurbon Oslo kiel kongresejon, kiu estas natura centro geografia de la nordaj landoj.

Norvega Esperantista Ligo lasis al la loka Esperanto-klubo KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO aranĝi la kongreson, kiu estos la unua por la nordlandaj esperantistoj.

La kluba estraro elektis jenan Lokan Kongresan Komitaton

(LKK): C. Stöp-Bowitz, Kjell Gustavsen, Astrid Mansrud, Alfred Skyberg kaj John Berggren, ĉiuj membroj de Klubo Esperantista en Oslo. La kongresejo en Oslo estos la Universitato ...”

”La plej grava aranĝo ... estos la Komuna Kunsido, dum kiu oni diskutos la problemojn rilate al la temo NORDLANDA KUNLABORO. Antaŭ la diskuto okazos malgrandaj enkondukaj prelegoj pri kelkaj gravaj flankoj de la ĉef-temo, nome pri ‘Niaj organizaĵoj’, ‘Ekonomiaj problemoj’ kaj ‘Informa laboro.’”

(Informo trovita en LE Nov-Dec. 1964)

Sufiĉe regulaj kontaktoj inter la estraroj de la nordiaj landoj okazis dum la 1960-aj ĝis 1980-aj jaroj.

- Dum la aŭtuno 1986 estis aranĝita “Nordisk Träff”, Nordia renkontiĝo, en Bengtsfors en Vermlando, kie prelegis Bengt Thelin, sekciestro ĉe la sveda supera lerneja administracio.
- En 2006 okazis komuna kongreso inter DEA kaj SEF en Malmö, kiam ni celebris la 100-jariĝon de SEF kaj ankaŭ de la malmoa klubo. La kongreso estis bone aranĝita, iomete simila al “mini-UK”. Prelegis ekzemple Georgo Handzlik kaj Sean O’Riain, kaj ni la unuan fojon konatiĝis kun la nuntempe fama bando La Perdita Generacio.

Ann-Louise Åkerlund

Prezentata dum la kongreso 2018

Venis nefermita letero al la kongresaj partoprenantoj kaj la estraro

La skribanto de la letero opinias ke la kongreso, simile al la antaŭa kongreso en Pollando, malhelpas al membroj partopreni pro ekonomiaj kaŭzoj. La kongresoj iĝas turismaj vojaĝoj precipe por la elitaj esperantistoj. La skribanto demandas ĉu decidoj faritaj dum tiaj jarkunvenoj estas ĝustaj pro manko de multaj membroj. La skribanto ankaŭ pledas por ke la jarkunvenoj estu en la sveda lingvo. Tiel pli multaj partoprenantoj povas partopreni en la diskutoj.

Se oni volas festi datrevenojn aŭ aliajn solenaĵojn oni povas aparte aranĝi tiujn kaj ne kunligi ilin kun la jarkunveno, daŭrigas la skribanto.

En Ponto 2018-3
Sten Svenonius sumigas diskuton farita en la klubo de Malmö pri la ofte levita demando pri jarkunsida lingvo kaj proponas solvon.
/Redaktoro

/La letero estas sumigita de la redaktoro.

Klubaj vesperoj en Stockholm

Dum marto kaj aprilo la klubo de Stockholm aranĝis "lingvan duŝon" kun deko da partoprenantoj. Oni ludis kartludon, kiu bone inspiras al libera interparolo, kaj krome estis horo da skajpa kunveno kaj horo da kantado.

En alia aprila vespero, triopo da membroj prezentis teatraĵeton "Rigardu antaŭ ol salti", kiun verkis Harold Brown. La prezento okazis per voĉlego el libro de teatraĵetoj.

Ulla Luin



Teatraĵeto en la klubo de Stockholm, aprilo 2018.
Sur la bildo: Soile Lingman, Kerstin Rohdin, Tatu Lehtilä. (Fotis: Ulla Luin).



Vortara laboro

Nun 16 literoj estas prilaborataj en la grupa laboro pri la vortaro de Roland Lindblom. Sep personoj laboras pri la vortoj, kaj unu pri la prizorgo de la komputila sistemo.

Temas pri la esperanto-sveda vortaro, kiun Roland Lindblom komencis verki kune kun malgranda laborgrupo antaŭ pli ol dudek jaroj. Antaŭ unu jaro komenciĝis la laboro enskribi la tekstojn en komputila datenbazo. Kelkaj literoj estas jam pli-malpli enskribitaj, kaj pri ili oni laboras nur se estas ŝanĝo de iu principo pri ekzemple mallongigoj de klarigoj.

En kunveno de la klubo de Stockholm en marto, du el la laborgrupo partoprenis kaj rakontis pri la laboro.

La diskuton pri la laboro oni povas sekvi en "Diskutejo", sub "intere.se".

Ulla Luin

Dankon Amika Rondo!

Mi memoras kiam mi unuafoje venis al la klubo de Sundsvall antaŭ tri jaroj. Antaŭ tio mi neniam parolis kun iu en Esperanto. Estis tre bonveniga renkontiĝo, kiun sekvis multaj pliaj. Inter la klubanoj mia memfido pri paroli la lingvon kreskis. Iliaj rankontoj pri spertoj de Esperantujo inspiris min al daŭrigi la lernadon.

Lastatempe okazis pluraj bonetosaj renkontiĝoj en la urbo. Ĉeestis ĉiujn tri fojojn kaj klubanoj kaj partoprenantoj de la kurso kiun gvidas Åke

Näsholm. Mi multe ĝojas pri tio. Legeblas pli pri la renkontiĝoj ĉe esperantoforbundet.se.

Baldaŭ mi translokiĝos al alia urbo por komenci miajn universitatajn studojn. Mi deziras danki ĉiujn membrojn de Amika Rondo pro multaj agrablaj memoroj kaj granda subteno. Sendube mi revenos al Sundsvall kaj volonte denove renkontos vin.

Ingrid Antonia Berglund





"Ekspreso", la membrofolio de la Esperanto-Klubo de Stockholm.

Partoprenu en majo - aŭgusto!

- Somere estos kafejaj kunvenoj en kvin merkredoj.
- På sommaren blir det kafé-träffar fem onsdagar.



PONTO ★

Organo de Sunda Esperanto Agado

El la aŭtuna programo de la klubo en Malmö

Dimanĉe 12.8

11-16 h

MalmöFestivalo

Tago de la societoj, Gustav Adolfs torg
Ni informos pri Esperanto

Sabate 1.9

10-12 h

Biciklogrupo de KEM

Ni informos pri Esperanto

Dimanĉe 2.9

12-16 h

Aŭtuna festo en Beijers park

Ni informos pri Esperanto

KELKLINIE PRI...

2018:2

38:a jarkolekto

Till hösten planerar vi ett klubbmöte där Agneta Emanuelson och Roland Eriksson berättar om Världsesperantokongressen i Lissabon och ILEI:s kongress i Madrid.

Andra klubbmöten som kan bli aktuella under nästa vintersäsong är:

- Carla Eggertsson Karlström berättar och visar bilder från Gran Canaria från besök hos dottern som där arbetar som sjukgymnast.

- Wilhelm Ternborg berättar om hur man bygger hus i Sri Lanka och visar tropiska bilder när vintern är som mörkast i Norrköping.

Esperantoklubo en Norrköping

El la horizonto de Gotenburgo

Sommardagar i Göteborg – prova en intensivkurs i

Ora Ĵurnalo ★

Jam alvenis 7 numeroj de Ora Ĵurnalo. Vizitu la retejon:
<http://www.esperanto-gbg.org/>

Esperanto 2018

– ett logiskt och spännande språk med globala ambitioner.

Plats: Redbergsskolan. Grupper på tre olika nivåer.

Tid: må 25 – fr 29 juni 2018 kl. 10–15.

Sista dagen gör vi en utflykt och prövar att tala esperanto.

Avgift 100:–/dag = 500:– Pg 436 12-1



Arrangörer: Göteborgs Esperantoförening, Esperantolärarnas förbund ILEI och Studieförbundet Vuxenskolan.

Läs mer på Esperantoföreningens hemsida:
www.esperanto-gbg.org

Mer info: Siv Burell 070-721 34 79

Kio estas la nova nomo de Svazilando? – Svazilando aŭ Svaziio aŭ Svaziujo
(Umbuso weSwatini en la svazia) estas ŝtato en suda Afriko. Ĉefurbo – Mbabano.

Kungen byter namn på Swaziland (spraktidningen.se)

När kung Mswati III firade 50 år passade han också på att byta namn på det land han styr – från Swaziland till eSwatini. Den afrikanska monarkin är lika gammal som kungen. Swaziland blev självständigt 1968. Samma år föddes Mswati III, som 1986

skulle bli historisk när han kröntes till kung vid 18 års ålder. Det sägs enligt Reuters att han är trött på att Swaziland i utlandet ständigt förväxlas med Switserland. Nyligen aviserade han att Swaziland byter namn till eSwatini. Det är en namnform som han själv använt i olika

sammanhang under en längre tid. På siswati, det bantuspråk som är modersmål för en majoritet av befolkningen, heter Swaziland just eSwatini, 'Swaziernas land'."

Inga Johansson
(saxat från klubbens hemsida)

Naciaj aŭ internaciaj vojoj, tra la mondo, ekzistas multaj famaj vojoj:

- la Vojo Sankta Jakobo de Kompostelo estas konata por pilgrimadi,
- la Vojo 66 por trairi la Usonon de oriento ĝis okcidento (3945 km) motorbicikle,
- la Vojo Rikardo Leon Koro (fama batalanto) por viziti kulturen kaj artistan heredaĵon,
- la franca Nacia Vojo 7 pro sia beleco,
- la Vojo Via Domitia kiel unua vojo ligante la Alpojn kun la Pireneoj.
- ...

Do, pro diversaj kialoj, kelkaj vojoj estas tre konataj.

Mia ideo estas krei la internacian vojon; **ESPERANTO danke al ZEOj.**

Sed ĉu vi konas “ZEOn 1”? ZEOj (Zamenhof/Esperanto-objektoj /vidu Vikipedio) ekzistas delonge sed, laŭ mi, ili ne estas sufiĉe konataj, bedaŭrinde.

Do, mi deziras inviti vin pripensi tion kune: kiel valorigi ZEOjn por krei la internacian vojon ESPERANTO ?

Eble ni povus publikigi librotojn kun ĉiuj ZEOj de la Mondo kaj fari pasporton, kiu estus subskribita de la turismaj oficejoj aŭ la urbodomoj ?

Tiel la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj kaj Esperanto estu pli konata en la institucioj.

Ĉu vi havas aliajn ideojn?

Por pli da informoj, bonvolu skribi al:

Isabelle NICOLAS

Isabelle.Nicolas2@gmail.com



Ekzemplo de ZEO: Parko Esperanto (Esperantopark), Wien (Aŭstrio) / Sunjo, Vikipedio



(Saxat ur Ponto 2018-3)

Esperantaĵoj ŝanĝas posedanton

En Kopenhago libroj iras al Afriko por trovi novajn legantojn. Bona kaj utila afero.

En Malmö ni liveris "artefaktojn" al la urba arkivejo.



Kiam ni liveris la librojn al la Brusela kontakto. De la maldekstre Peter Wraae, William kaj Betty Chatterjee.



Jen kiel aspektis ekster la klubejo en Malmö 20.4 kiam Per-Olov kaj Sten faris transporton al la arkivejo.

Adam Smith – Vivo kaj verko

Bo Sandelin verkis maldikan libron pri *Vivo kaj verko* de *Adam Smith*, la konata skota ekonomikisto kaj filozofo kiu grave influis la ekonomikan pensadon. Adam Smith famiĝis pro siaj du klasikaj libroj, nome *La Teorio de Moralaj Sentoj* (1759) kaj *La Riĉeco de Nacioj* (1776). El tiuj la lasta estas la plej konata.

En la libreto vi trovas inter alie vivpriskribon kaj apartajn ĉapitrojn pri la du menciitaj verkoj de Adam Smith. Ĉar Bo Sandelin estas esperantisto, li ankaŭ dediĉis unu ĉapitron al la pensado de Adam Smith pri lingvoj.

La libro estas facile legebla kaj pro la lingvo kaj pro la profesia paĝaranĝo. Ĝi enhavas 80 paĝojn por legi.

Mi, kiu antaŭe nenion legis de aŭ pri Adam Smith, trovis tiun maldikan libron trezoro por iom eklerni pri li.


Troviĝas kelkaj citaĵoj el la verkoj de Adam Smith, sed mi ne trovis indikon ĉu Bo Sandelin mem tradukis ilin. Verŝajne jes, ĉar neniu fonto notita en la literatura listo estas esperantlingva. Plurloke en la libro estas iaj fontindikoj, ekz L.iii.2.1 aŭ V.i.g.15, sed mi ne trovis klarigon kiel kompreni ilin.

Malmultaj preskoboldojn mi trovis, ekz **esta** (anataŭ estas, p30), **profesor.** (profesoro, p37), **ka** (ke, p40), **avantaga** (avantaĝa, p66). Verŝajne la jarindiko kiam la duko mortis estas erara. Devus ja esti 1766 anataŭ 1776 (p54).

Malmultajn vortojn mi devis serĉi en PIV, ekz **panegira**, **precepto**, **abnegacio**. Sed pro tio ni esperantistoj legas librojn por ke ni progresu en nia lingvosocio.

Ankaŭ vi legu la libron!

Bengt Olof Åradsson



Adam Smith – Vivo kaj verko
Bo Sandelin.
Mondial. New York. 2018.
85 paĝoj.
Prezo: 9.90 € ĉe UEA

Esperanto-Gården kämpar på – inbjuder till kulturfestival med kurser

Esperanto-Gården valde på sitt medlemsmöte den 4 februari följande ledamöter för två år Lennart Svensson (vice ordf), Martin Strid och Bengt Nordlöf, som återkommer som styrelsemedlem efter många år. I styrelsen fortsätter Anna Ritamäki-Sjöstrand (ordf) och Gunnar Olsson. Till ersättare återvaldes Douglas Draper och Sonja Persson.

En ny värmepump har tack vare lån från kooperativets medlemmar



Sur la foto estraranoj Bengt Nordlöf, Lennart Svensson, Anna Ritamäki-Sjöstrand, Martin Strid kaj Douglas Draper dum laborvizito en aprilo-majo 2018. /Största delen av Esperanto-Gårdens styrelsemedlemmar



Helena Kotilainen kaj Tatiana Rodakova helpis dum aprilo-majo. / Betydande frivilligt arbete på Esperanto-Gården kring den 1 maj.

installerats till bergvärmesystemet som kooperativet installerade på 1990-talet för att ersätta den gamla som gav upp i vintras. Vandrarhemsverksamheten löper på och samarbetsdiskussioner har förts med andra lokala företag samt kommunen för att hitta nya lösningar för mer stabila inkomster i framtiden. Det finns dock fortfarande ett stort behov av att förstärka ekonomin, och särskilt behöver Esperanto-Gården fler aktiva som kan hjälpa till med renoveringar, upprätthållande av verksamheten och särskilt utvecklandet av verksamheten.

Verksamheten har två gånger påverkats av negativ publicitet. Aftonbladet publicerade den 6 april en skandalartikel med bilder som en missnöjd man skickat in. Personen hade i väntan på mer passande åtgärder anvisats boende på Esperanto-Gården av Filipstads kommun, som numera anlitar vandrarhemmet regelbundet.

Personen, som aldrig övernattade hos oss, hade smugit sig in i den korridor vi har avstängd för kunder för tillfället. Ett av rummen är vattenskadat på grund av en takläcka. I artikel såg det ut som om vi anvisat honom boende i just det rummet, i sängar utan madrass. Korrekt information spreds i lokalpressen och på vår Facebooksida.



Den andra skandalen som påverkade oss gällande vår styrelsemedlem Martin Strid. Hans uttalande på Sverigedemokraternas landsdagar blev huvudnyhet i Sverige den 26 november, och spreds i flera länder. Han kritiserade brister på humana värderingar inom islam, såsom kvinnoförtryck och förföljelse av personer som lämnat islam, men hans ordalag var så svepande att man kunde uppfattade det som att han inte ser muslimer som människor, vilket han själv djupt har beklagat. Martin var en central aktör i planeringen av Kultura Esperanto-Festivalo, men i kölvattnet av skandalen stannade arbetet upp under en lång tid, särskilt på grund av kritik inom esperantorörelsen. Vi har i alla fall kommit fram till att Martin är lika intresserad av alla människors lika värde nu som före denna offentlighet, och hoppas på öppenhet för olikheter på alla plan i samband med KEF, där Martin bland annat kommer att lära ut esperanto via färisk kvaddans.

Anna Ritamäki-Sjöstrand

Kultura Esperanto-Festivalo 13 – 19 juli 2018



Artistoj de la pasintjara evento revenos por KEF 13-19 julio, interalie Ĵomart kaj Nataša kaj Kim Henriksen

Ni festu originalan esperantokulturon! Krom la plenaj kulturaj spertoj, kursaj trakoj por lernantoj ekde komencantoj. Programo por infanoj.

Ni estas dankemaj se vi venas jam pli frue por helpi pri la preparoj.

Diversaj kotizkategorioj, interalie amasloĝeja alternativo. Se vi estas Nordia

kulturkreanto origine en Esperanto ne hezitu kontakti nin, ĉar eĉ se eble ni ankoraŭ ne kontaktis vin ni deziras vian ĉeeston.

Se vi volas pli da informoj por partopreno/kontribuo, kontaktu nin ekzemple je: info@esperantogarden.se

Kunordiganto estas:

Anna Ritamäki-Sjöstrand,
prezidanto de E-G.

Vidu surrete:

<https://www.facebook.com/events/181651099042155/>
(evento de Esperanto-Gården en Facebook).